

Mark Fettes

Simon Fraser University, Kanado

Probal Dasgupta (1953–2026)



Nekrologo

La 1-an de junio 2026 forpasis en Kalkato prof. Probal Dasgupta (Daŝgupto), membro de la redakta komitato de nia revuo *Esperantologio/Esperanto Studies* kaj unu el la gvidaj intelektuloj de la Esperanto-komunumo dum la lastaj 50 jaroj. Profesia lingvisto, li legis kaj verkis vaste, diverslingve kaj diversĝenre, kaj lia influo al postaj generacioj de barataj lingvistoj estis granda, aparte sur la kampo de la bengala lingvistiko kaj literaturo, gramatika teorio, kaj la filozofio kaj sociologio de plurlingveco. Pri Esperanto kaj interlingvistiko li verkis kelkajn notindajn studojn, kaj kiel ano de la Akademio de Esperanto li kontribuis al diskutoj pri lingva evoluo kaj lingvaj normoj tra pluraj jardekoj.

Naskita en Kalkato en 1953, li pasigis siajn unuajn jarojn tie kaj en Novjorko, Usono, kie liaj gepatroj ambaŭ doktoriĝis ĉe la universitato Cornell – la patro pri historio, la patrino pri psikologio. Esperanton li eklernis ĉe la patrino; jam en la 60-aj jaroj li konatiĝis kun la bengala pioniro Lakshmiswar Sinha (Dasgupta 2010) kaj komencis korespondi internacie kun verkistoj kaj aktivuloj. Liaj lingvistikaj studoj ĝermis en Barato

(BA, Universitato de Kalkato, 1974; MA, Kolegio Deccan (Puneo), 1977) kaj pludisvolviĝis en Usono, kie li doktoriĝis ĉe Novjorka Universitato (NYU) en 1980. Dum tiu studenta tempo li konatiĝis kun gvidaj figuroj de la Esperanto-movado, volontulis en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Roterdamo, kaj komencis mem instrui la lingvon, unue ĉe la Ŝtata Universitato de Sanfrancisko en 1978; en Novjorko mem, li kunlaboris en la reprezentado de (UEA) ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Li ankaŭ publikigis sian unuan literaturan tradukon en Esperanto, kolekton de poemoj de Robindronath Tagor, sub la titolo *Primico* (1977).

Reveninte en Baraton, Daŝgupto ricevis sian unuan akademian postenon ĉe la universitato, kie li magistriĝis: Kolegio Deccan, Puneo, kiel li restos ĝis 1989. En tiu periodo li dum kelkaj jaroj redaktis la fakrevuon *Indian Linguistics* (1982–1987) kaj elektiĝis al la Akademio de Esperanto (1983). Lia multflankeco evidentiĝas el liaj tiamaj publikaĵoj, pri gramatiko, literatura teorio, socilingvistiko kaj aliaj branĉoj de la lingvaj kaj sociaj sciencoj. En 1989 li fariĝis profesoro ĉe la Universitato de Hiderabado, kaj la postan jaron li ekkunlaboris en la redaktado de *Language Problems and Language Planning* (LPLP), la revuo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (ĝis 2013). En postaj jaroj li fariĝis kunredaktoro de libroserio pri Lingvo kaj Evoluigo ĉe la eldonejo Sage (1993–2004) kaj la Almanako de Sud-Aziaj Lingvoj kaj Lingvistiko (1998–2006). En 2001 li fariĝis vicprezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2016), kaj en 2004 li elektiĝis honora membro de la Lingvistika Societo de Ameriko. Dum kelkaj jaroj (2002–2007) li estis membro de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA, la lastan jaron kiel ĝia prezidanto.

La lastan parton de sia kariero Daŝgupto pasigis ree en Kalkato, sia naskiĝurbo, kiel ĉefo de la Fakoj pri Lingvaj Esploroj de la prestiĝa Barata Statistika Instituto (2006–2018). Dum tiu periodo li ankaŭ plenumis du mandatojn kiel Prezidanto de UEA (2007–2013), kaj kunlaboris en la literatura revuo *Beletra Almanako* ekde ties unua numero en 2007. Post sia emeritiĝo li restis aktiva partoprenanto en la intelekta vivo barata kaj esperanta, interalie kiel prezidanto de la Akademio (2016–2026); en 2021 li ricevis la premion Vidyasagar-Dinamoyee, aljuĝitan de la ŝtato Okcidenta Bengallando, pro sia tutviva kontribuo al la bengala kulturo. Lia forpaso dumdorme je la aĝo de 72 jaroj estis ŝoka por liaj familianoj, amikoj kaj kolegoj.

La gamo de verkaj kontribuoj de Daŝgupto, en kvin lingvoj aŭ pli, rezistas koncizan resumon. Eblas diri, tamen, ke lia verkaro sisteme asertas la valoron de malgrandaj kaj lokaj lingvoj, la dignon de marĝenuloj kaj subpremitoj, kaj la kreaĵn eblojn de individua kaj kolektiva rezisto al diversaj hegemonioj. Pli ol ortodoksa lingvisto, li estis lingvo-filozofo por

kiu la mondo konstante prezentis invitojn al reinterpretado. En tiu senfina vivprojekto, li konsideris Esperanton radikale grava, kaj ofte prezentis ĝin tia al apenaŭ komprenanta publiko, ĉu esperantista, ĉu alia. Lia amo al originalaj metaforoj kaj vortludoj foje kontribuis al la konfuziĝo de la aŭskultantoj kaj legantoj. Kaj tamen, ne eblis eviti la impreson, ke sub la tekstaj malfacilaĵoj troviĝas pensomondo vasta kaj fekunda.

Frua ekzemplo de tiu argumenta stilo estas lia kontribuo al speciala numero de LPLP en la jubilea jaro de Esperanto, 1987. En anglalingva artikolo li tezis, ke:

kelkaj fakuloj pri certaj specoj de sociaj kaj lingvistikaj esploroj (ekzemple la kritiko de scio, la genealogio de kulturaj formoj, la Sapira studo de etnolingvistikaj formiĝoj kaj la universalaj antaŭsupozoj de tradukado inter ili, genera gramatiko) eble dezirus preni sur sin la seriozan studadon de Esperanto-kulturo. Ili povas lerni per tia serioza dialogo, ĉar ili trovos, ke iliaj propraj iniciatoj dividas kun tiu kulturo (kiel scia praktiko) multajn ŝlosilajn premisojn kaj celojn. Unu komuna celo estas maksimumigi multflankajn kaj simetriajn komunikajn praktikojn. La praktikaj kialoj por tio estas reliefigitaj en movadoj, kiuj montras seniluziliĝon kun teknokrata progreso (ekzemple feminismo, ekologio). La nuna referaĵo fokusiĝas je la teoria bazo de la partoprenema motivo komuna al tiaj movadoj, kaj pridiskutas Esperanto-kulturon en la kunteksto de tiu priokupiĝo. Specife, la verkinto proponas, ke Esperanto similas ŝipon, etnaj lingvoj similas landojn, kaj la troa emfazo je la solideco kaj kontinueco de “naciaj” lingvaj heredaĵoj estas signifa minaco, tie ĉi nomata Heredaĵismo kaj identigata kiel la komuna ideologio, de kiu socilingvistikaj fakuloj kaj esperantistoj evoluigadas esence la saman substancan kritikon. (Dasgupta, 1987, resumo de la aŭtoro)

Tiun “substancan kritikon” li mem disvolvis en kelkaj libroj, plej notinde *The Otherness of English: India’s Auntie Tongue Syndrome* (1994) pri la “onklina” rolo de la angla en la barata kulturo, kaj du libroj pri “substancismo”, *After Etymology: Towards a Substantivist Linguistics* (2000, kun Alan Ford kaj Rajendra Singh) kaj *Inhabiting Human Languages: The Substantivist Visualization* (2011). Kerne, temas pri ĉampionado de la nefermita varieco de la parolkomunuma lingvouzo, unuavice pro lokaj kulturaj realaĵoj, kontraŭ la tro rigida universalismo kaj raciemo de la moderna lingvistiko (por traduko de la dua libro, vidu Daŝgupto 2011; por konciza prezento de la ĉefa argumento, vidu Dasgupta 2021).

Tamen, kredeble liaj multaj artikoloj, libroĉapitroj kaj prelegoj pli grave kontribuis al lia reputacio, sur la interlingvistika kampo same kiel aliaj. Plena bibliografio certe enhavus centojn da eroj. Relative malgranda

proporcio temas rekte pri Esperanto, sed lia frua enamiĝo al la lingvo influis lian tutan verkaron. Ĉi tie listiĝas deko da kontribuoj al diversaj revuoj kaj artikolkolektoj, ofte en libroj por omaĝi korifeojn de la esperanta kulturo. Kelkaj traktas aspektojn de Esperanto en aliaj lingvoj. Tiurilate notindas lia bengallingva esearo el 2015, *Merur praarthonaa: bisharger uttor* (La polusoj preĝas: la ekvatoro respondas). La enkondukon al tiu libro, iom adaptite, li publikigis en *Beletra Almanako* en esperanta traduko, kie li klarigas la signifon de la titola metaforo jene:

En ĉi tiu libro, la neŭtralan lingvon Esperanto mi hisas kiel simbolan standardon por povi kune kun vi elformuli la ideon ke la civila socio nepre devas ĉesi solidigi la limojn inter ‘ni’ kaj ‘ili’; ne plu allasi ke la diversaj sekcioj de la socio polusiĝu; ĉie establi ‘ekvatorajn’ podiojn inter la ‘polusoj’. Esperantistoj estos aparte kontentaj vidi ke sur tiaj podioj sin esprimas kaj aŭskultiĝas plej diversaj voĉoj, kaj ke pro tiu reciproka aŭskultado ĉies kapablo pripensi kaj pritaksi maturiĝas en nia kulturo. (Dasgupta 2021)¹

Tiu emfazo je reciproka aŭskultado estis karakteriza por Daŝgupto, kaj fundamentis ne nur lian teorion aliron al literaturo sed ankaŭ lian praktikon kiel tradukisto. Li aperigis kvin librojn en Esperanto tradukitajn el la bengala, kaj tri librojn en la bengala tradukitajn el Esperanto. La unua grupo inkluzivas tri diversĝenrajn librojn de lia patrino Manashi Dasgupta, kolekton de 50 poemoj de Robindronath Tagor, kaj la romanon *Klera edzino* de Upendronath Ganggopaddhae. La dua grupo inkluzivas la teatraĵon *Nemeza* de Alfred Nobel (origine en la sveda), la romanon *Sep fratoj* de Aleksis Kivi (origine en la finna) kaj la infanlibron *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* de Ivana Brlić-Mažuranić (origine en la kroata). En la bengala, lia literatura aktiveco estis tia, ke en 2012 li ricevis la Premion Archana Chaudhuri de *Bangiya Sahitya Parishad*, la bengala literatura akademio.

Preter ĉio ĉi, Daŝgupto elvokis amon kaj lojalecon ĉe siaj studentoj kaj admiron kaj amikecon ĉe siaj kolegoj. Lia persona ekzemplo kaj verkaro liveris konvinkan pruvon, ke Esperanto povas esti konsiderata grava kaj aktuala demando ankaŭ por homo el la “monda Sudo”, kaj ke la modernaj rimedoj de gramatika, literatura kaj socia teorio estas aplikeblaj al Esperanto same kiel al aliaj kulturkomunumoj. Tio verŝajne restos lia plej daŭrema intelekta testamento.

1 Tiu teksto el *Beletra Almanako* estas legebla en la persona blogo de Daŝgupto, ĉe <https://probaleo.wordpress.com/2021/03/>.

Elektitaj publikaĵoj

- Daŝgupto, Probal. 1987. "Kategorioj, la fleksio, la lingvistiko, kaj radikoj en Esperanto." En *Centjara Esperanto: jubilea libro de Akademianoj*, redaktis Geraldo Mattos, 63–75. Chapecó: Fonto.
- Daŝgupto, Probal. 1987. "Adverboj en Esperanto." En *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, volumo II: *Esperantismo*, redaktis José-Luis Melena Jiménez k.a., 119–130. La Laguna: Universidad de La Laguna.
- Dasgupta, Probal. 1987. "Towards a dialogue between the sociolinguistic sciences and Esperanto culture." *Language Problems and Language Planning* 11, kajero 3: 305–334.
- Daŝgupto, Probal. 1989. "Degree words in Esperanto and categories in universal grammar." En *Interlinguistics: Aspects of the science of planned languages*, redaktis Klaus Schubert, 231–247. Berlin: Mouton De Gruyter.
- Dasgupta, Probal. 1989. *Projective Syntax: Theory and Applications*. Pune: Deccan College Postgraduate and Research Institute.
- Dasgupta, Probal. 1993. *The Otherness of English: India's Auntie Tongue Syndrome*. New Delhi: Sage.
- Singh, Rajendra, Probal Dasgupta kaj Jayant K. Lele. 1995. *Explorations in Indian Sociolinguistics*. New Delhi: Sage.
- Daŝgupto, Probal. 1998. "Facila lingveto, peza lingvego, ĉu?" En *Menade bal pŭki bal: Festschrift zum 50. Geburtstag von Reinhard Haupenthal*, redaktis Henri Vatr , 83–94. Saarbr cken: Iltis.
- Daŝgupto, Probal. 1999. "La toleremo kaj aliaj artoj." En *Lingva arto: Jubilea libro oma ge al William Auld kaj Marjorie Boulton*, redaktis Vilmos Benczik, 40–49. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Dasgupta, Probal, Alan Ford kaj Rajendra Singh. 2000. *After Etymology: Towards a Substantivist Linguistics*. M nchen: Lincom Europa.
- Dasgupta, Probal. 2000. "Culture, sharing and language." En *Rights to language: Equity, power and education: Celebrating the 60th birthday of Tove Skutnabb-Kangas*, redaktis Robert Phillipson, 49–51. Mahwah, NJ: Lawrence Erlbaum.
- Daŝgupto, Probal. 2000. "Nomi kaj karakterizi." En *De A al B. Fest-libro por la 75a naski -tago de D-ro Andr  Albault*, redaktis Irmtraut Haupenthal kaj Reinhard Haupenthal, 75–82. Schliengen: Iltis.
- Dasgupta, Probal. 2008. "The South and Esperanto in the post-orientalist public space." *Indian Journal of Linguistics* 24: 11–28.
- Dasgupta, Probal. 2010. "Recontextualizing Lakshmiswar Sinha." *Language Problems and Language Planning* 34, kajero 3: 259–266.
- Dasgupta, Probal. 2010. "La postnacia literatura entrepreno kaj Esperanto." En *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 695–701. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

- Dasgupta, Probal. 2011. *Inhabiting Human Languages: The Substantivist Visualization*. New Delhi: Samskriti/ICPR.
- Daŝgupto, Probal. 2011. *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo*. New York: Mondial.
- Dasgupta, Probal. 2015. *Merur praarthona: bisharger utor* (La polusoj preĝas: la ekvatoro respondas). Kolkato: Abhijan.
- Dasgupta, Probal. 2021. "On certain consequences of the objectification of languages: a substantivist approach." *Linguistic Frontiers* 4, kajero 2: 6–22. <https://doi.org/10.2478/lf-2021-0013>
- Dasgupta, Probal. 2021. "Antaŭparolo al *La polusoj preĝas: la ekvatoro respondas*." Probaleo [blog] 21.03.2021. <https://probaleo.wordpress.com/2021/03/>

Tradukoj en Esperanto

- Tagor, Robindronath. 1977. *Primico* (poemoj, tr. el la bengala). Antwerpen: TK/Stafeto.
- Dasgupta, Manashi. 1989. *Mi juna* (aŭtobiografio, tr. el la bengala). Rotterdam: Esperantaj Kajeroj.
- Gangopaddhae, Upendronath. 1994. *Klera edzino* (Serio Oriento-Okcidento 29) (romano, tr. el la bengala). Pisa: Edistudio..
- Dasgupta, Manashi. 2006. *Dormanta hejmaro* (romano, tr. el la bengala). Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo.
- Dasgupta, Manashi. 2023. *Ses trovnoveloj* (noveloj, tr. el la bengala). New York: Mondial.

Pri la aŭtoro

Mark Fettes estas la direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado. Liaj esploroj traktas interalie la mastrumadon kaj revigligon de indigenaj lingvoj, la sociologion de la Esperanto-komunumo, kaj multlingvismon en la programoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Retadreso: mtfettes@sfu.ca

ORCID-numero: 0000-0003-4147-7879

About the author

Mark Fettes is the Director of the Centre for Research and Documentation on World Language Problems and Professor of Education at Simon Fraser University, Canada. His research deals with the management and revitalization of Indigenous languages, the sociology of the Esperanto community, and multilingualism in the programs of the United Nations among other topics.

Sur l'auteur

Mark Fettes est directeur du Centre de recherche et de documentation sur les problèmes linguistiques mondiaux et professeur d'éducation à l'Université Simon Fraser, au Canada. Ses recherches portent entre autres sur la gestion et la revitalisation des langues indigènes, la sociologie de la communauté espérantophone, et le multilinguisme dans les programmes des Nations Unies.